MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

6

JUNIO 2018 Kol. 398/34

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: S-ano R.Moerbeek, 34-a PSI, Sukcesa kurso, Rememora renkontiĝo, Skokovy 47x, La memortabulo de F.Vl. Lorenc

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Nia membro s-ano Rob Moerbeek fariĝis Kavaliro de la Ordeno de Oranje Nassau

Dum la jubilea Malferma tago de UEA, la 28-an de aprilo 2018, sinjoro Rob Moerbeek, konata aktivulo de la Esperanto-movado, transprenis de Martin Smit, urbestro de lia loĝloko Beverwijk, altrangan reĝan honorigon. La urbestro anoncis la nomumon de Rob kiel Kavaliro en la Ordeno de Oranje Nassau. Ĝi estas prestiĝa distingo fare de la reĝo de Nederlando por nederlandanoj por eksterordinaraj atingoj por la socio.

La urbestro listigis en sia formala, tamen bonetosa kaj amika parolado plurajn, sed tute ne ĉiujn meritojn de Rob Moerbeek, substrekante lian aktivan agadon por la Esperanto-movado, subtenon al la blindula movado, lian redaktoran, korektistan kaj instruan agadojn.

Rob Moerbeek ricevis de la urbestro belan medalon. La festo okazis inter esperantistoj, plurnacia publiko de la Malferma Tago kaj en la ĉeesto de la direktoro de la Centra Oficejo en Roterdamo, pluraj estraranoj de Universala Esperanto-Asocio kaj de la Nederlanda Esperanto-movado.

Nia redaktoro kore gratulas la honoriton kaj invitas la legantojn legi pri Rob Moerbeek en nia Panteono kaj postlasi por li gratulvortojn en nia paĝaro. Ĉiuj mesaĝoj aŭtomate tuj pluiras al lia poŝtokesto! Korajn gratulojn al Rob pro tiu altranga distingo kaj bonan sanon por lia estonta agado! Katalin Kováts en la nomo de edukado.net (transprenita el Komunikoj de UEA).

Multajn jarojn nia amiko Rob korektas ĉiumonate nian gazeton Informilo kun Antaŭen, por kio ni estas al li tre dankemaj. En la nomo de AEH ni sincere gratulas al li pro la ricevo de reĝa honorigo kaj deziras al li multe da sano, kontento kaj senĉesan bonhumoron. red.

La 34-a PSI en PLAUEN

La unuan fojon la Printempa Semajno Internacia okazis en la plej sudorienta parto de Germanio, en la urbo *Plauen* de la 30-a de marto ĝis la 6-a de aprilo 2018. Ĝi situas proksime al la ĉeĥa landlimo. La urbo havas ĉirkaŭ 65 200 loĝantojn. Ĝi famiĝis kaj riĉiĝis pro puntofarado. La ĉi-jaran PSI organizis la familioj Haumer, Buhr/Weil, Klünder kaj Sawitzki kun surloka helpo de

aliaj esperantistoj. Al la aranĝo aliĝis 109 samideanoj el 10 landoj kaj preskaŭ ĉiuj alvenis. Ni loĝis en la centro de la urbo en speciala loko de iama fajrobrigadejo transformita en junularan gastejon. La interno de la konstruaĵo rememoris pri tio per diversaj ornamoj kaj surmuraj desegnaĵoj.

La programo kontentigis ĉies postulojn. Okazis programeroj por etuloj, infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj. La plej malgrandaj infanoj ĝuis Mazi-kurson kaj vespere piĵamajn rakontojn de Nicky Janssen, kiu ankaŭ dumtage okupis aliajn per manlaboroj. Krom diversaj desegnaĵoj, bestetoj, maskoj, ludiloj, saketoj kaj tortoj el teleroj, la infanoj fervore kontribuis al pretigado de vera torto farata el biskvitoj kaj bombonoj por du feliĉulinoj festantaj la naskiĝdatrevenon. Kia ĝojo manĝi ĝin poste.

La gejunuloj ĝuis diversajn ludojn ekstere kaj interne de la konstruaĵo. Plaĉa al ili estis kaosludo, dancado laŭ indikitaj paŝoj helpe de komputilo, solvado de rubik-kubo, ĵonglado, origamio kaj aliaj. Eblis ankaŭ ŝakludi per grandaj figuroj en la korto de la konstruaĵo. Multaj ŝatis glitadon sur fajro-stango instalita en la domo. Infanoj ĝuegis aktoradon en mallonga filmeto pri fajrobrigadistoj, inventita kaj reĝisorita surloke de Christoph Frank kaj Ralf Haumer. Dum la semajno eblis ĉeesti E-kursojn de diversaj niveloj, lingvajn ludojn kaj interesajn kvizojn.

La plenkreskuloj ĝuis diversajn prelegojn, en kiuj oni akiris novajn sciojn pri sindefendo, pri amo, pri tajdo, pri komunumo Hermusando en Svedio kaj ĝia daŭripova evoluo, pri mondaj heredaĵoj de UNESKO en Ĉeĥio, pri la vivo kaj verkoj de la ĉeĥaj fratoj Ĉapek, pri diven-aparato. Al aliaj interesaj programeroj apartenas la ŝatata ovoserĉado, cirklodancado kaj fotokonkurso.

Pri la aranĝo interesiĝis ankaŭ ĵurnalistoj. Okazis intervjuoj kaj poste aperis artikolo en la loka ĵurnalo. Kiel kutime dum la tuta aranĝo funkciis libroservo prizorgata de FEL (Flandra Esperanto-Ligo). Kelkaj interesatoj grupiĝis por kantado kaj muzikado. Matene eblis ekzerci ĉigongon, pri kiu spertas Dieter Menke, antaŭtagmeze praktiki viglan zumbon kun Zoja Haumer kaj post la vespermanĝo malstreĉigan gimnastikon kun Anna Dupechaud. Dikredantoj povis ĉeesti Matenan Laŭdon.

Post la tagmanĝo okazis ĉiutage ekskursoj kaj promenadoj. Eblis viziti infanan amuzparkon, drakan kavernon, hidroelektran stacion, muzeon pri brodaĵo, la *Elster*-ponton, la bankomplekson *Agua World*, urbogvidadon per speciala historia bierelektra tramo, aŭtomobil-muzeon en *Zwickau* kaj du aliajn lokajn muzeojn. Ni mem vizitis la urbojn Hof, Elsterberg, Greiz kaj ĉe la forveturo Waldsaasen. La vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Koncertis por ni la grupo Ĵele kaj Kaŝi. Christoph Frank transportis nin per magia vojaĝo tra la mondo al Italio, Ĉinio, Hindio, Ĉilio, Usono kaj prezentis kelkajn surprizajn magiaĵojn, kiujn ni tre ĝuis. Gaja etoso regis dum la

paska fajro kun rostado de pastaĵo sur stango. Originala estis vespera balo en fajrobrigadaj kostumoj pruntitaj surloke. Ankaŭ nokta promeno tra la urbo kun loka gvidanto plaĉis al ĉiuj, kiuj ĝin partoprenis. Malfrue vespere eblis spekti kinejajn filmojn kaj babili en trinkejo kun amikoj.

La lasta, adiaŭa vespero estis dediĉita al niaj talentuloj. Eksonis muzikado, kantoj, Danka Leyk organizis cirklodancon kun kandeloj, estis prezentita la filmeto "Fajro" pretigita surloke, Ralf Haumer prezentis kaj invitis la ĉeestantojn al la venonta PSI, kiu okazos en Hochspeyer/Rejnland-*Palatinato* (proksime al *Saarbrücken*) de la 15-a ĝis la 22-a de aprilo. Ĉiuj estas bonvenaj al tiu agrabla renkontiĝo, kie oni festas Paskon kaj bonvenigas printempon! Per dankoj al la organizantoj kaj prelegantoj finiĝis la ĉi-jara PSI. Liba Gabalda

Sukcesa kurso en Mladá Boleslav

En urba biblioteko de Mladá Boleslav diligente studis

Esperanton naŭ homoj – freŝaj pensiuloj, dum tri monatoj februaro, marto kaj aprilo kaj ili petis daŭrigon de la studo aŭtune. La direktorino de la biblioteko promesis denove uzon de projekciilo kaj komputilo en salono de la dua etaĝo. Dum somero la gaja kolektivo kunvenos en la urba ĝardeno ĉe la universitato de la tria aĝo „Klementinka“ de junio ĉiun merkredon de la 10-a horo, kie povas nin viziti kiu ajn. Iuj jam deziras korespondi per facila simpla lingvo rete aŭ letere. Ĉu vi povas skribi al ili? Ni sendus adresojn. J. Drahotová

Rememora renkontiĝo

de la familio kaj geamikoj de la operkantisto Miroslav Smyčka en la praga tombejo Olšany la 25.4.2018.

La renkonto estis tre emocia, ni aŭdis eĉ kanti etan nepon kaj deklami filinon de Miroslav, ankaŭ ni aŭdis lian voĉon (registritan sonon). red.

Skokovy kvardek sep foje

Sub pure blua ĉielo okazis la 47-a lingva seminario de la 2-a de majo ĝis la 6-a de majo 2018 en la vilaĝeto Skokovy en la pensiono Espero. Krom tiuj, kiuj fidele alvenadas, venis tri komencantoj, viroj, kiuj surprizis nin pro siaj entuziasmoj. El Pollando venis Jadwiga Zakrzewska el Jelenia Gora kaj el Svedio Kjel Bohenström el Uppsala kaj ĝojigis nin du gajaj knabinetoj el Jablonec.

Diligenta lernado okazis antaŭtagmeze, la naturo allogis ĉiujn posttagmeze kaj ni pasis vesperojn komune ĝuante prelegojn – pri la monto Bezděz, pri libroj, tradukoj de originaj verkoj en Esperanto kaj pri la filmo de la grava jubileo de la E- klubo Přerov. De Liberec venis prelegi s-ano Milan Kazdera pri historio de la libereca klubo. Mi promesis lian interesan manskribon ciferecigi, inkluzive de la letero al sinjoro Rudolf Burda, senditan la 24-an de septembro 1952 de la ĉefministrejo.

Ni ankaŭ kantis, parte ĉe la akompano de piano. La lasta vespero pasis en bona humoro, ĉar ĉiu el ni kontribuis. Entute ni estis 21.

Jam nun vi povas aliĝi por la 48a lingva seminario de la 19-a de septembro 2018.

drahotovaesperanto@seznam.cz

La memortabulo de F. Vl. Lorenc

La solena senvualigo de la memortabulo de F. Vl. Lorenc okazos la 8-an de julio 2018 de la 14-a horo antaŭ la biblioteko en la vilaĝo Vrdy (proksime de la urbo Čáslav.) La solenaĵo estos kunligita kun la renkontiĝo: venu je la 10:30 antaŭ trajnstacidomo en Čáslav, ni trarigardos urbocentron, komune ni tagmanĝos kaj vizitos naskiĝdomon de Lorenc en la vilaĝo Zbyslav.

Pli detalaj informoj pri la tuta programo aperos en la Kalendaro de aranĝoj en www.esperanto.cz ĝis duono de junio. Interesitoj pri rezervado de la loko en la restoracio kaj en la buso bonvolu aliĝi ĝis la 1-a de julio ĉe pavla.esperanto@gmail.com (poste sengarantie).

František Vladimír Lorenc jam kiel junulo, 3 jarojn post la eldono de la unua lernolibro de Esperanto de L. L. Zamenhof, skribis kaj eldonis per la propra kosto la unuan E-lernolibron por Ĉeĥoj. En sia 20-a jaro li enmigris Brazilon, kie li famiĝis

kiel poligloto, pedagogo, verkisto, tradukisto, kuracisto, filantropo; por spiritistoj li estas ĝis nun tre signifa mediumo.

Li konis kaj tradukis el 104 lingvoj inkluzive el multaj afrikaj dialektoj. En Brazila Rio-de-Ĵanejro estas nomata honore al li Spiritisma Eldona asocio F. V. Lorenz, lingvista instituto; en la urbo Dom Feliciano, kie Lorenc vivis, estas je lia nomo publika biblioteko. Tie videblas ankaŭ lia monumento.

jen propono de la memortabulo

Sian ĉeeston pri la senvualigo de la memortabulo promesis ankaŭ la ĝenerala konsulo de CZ en Brazilo Inĝ. Pavla Havrlíková, la aŭtoro de la memortabulo Zdeněk Myslivec, d-ro Petro Chrdle kaj d-ino Pavla Dvořáková, aŭtorino de la konstanta ekspozicio dediĉita al Lorenc.

J. Rýznarová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.